„Mutig vorwärts!“ „Kuraĝe antaŭen!“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Delegitaro kaj Esperanto-Delegitaro de Wien.

5a jaro. No. 12 Monata Decembro 1928

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.80, germanlandanoj RM 3.25, alilandanoj sv. fr. 4.25; ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Bundespräsident Miklas

über Esperanto auf eine Rundfrage von AE. im August 1926:

„Ich begrüße alles, was der Völkerverständigung dient. Hiezu ist eine allen Kulturnationen leicht verständliche und leicht erlernbare Hilfssprache zweifellos ein sehr geeignetes Mittel. Wenn Esperanto diese Verständigungssprache ist — und ich halte es dafür geeignet — und wenn es dem edlen Zwecke dient, daß sich die Völker wieder geistig verstehen und in friedlicher Arbeit zusammenfinden, ist es mir herzlich willkommen.

In diesem Sinne wünsche ich dem Esperanto größtmögliche Verbreitung und Aufstieg zur allgemeinen Weltverkehrssprache.“

Fred Niblo in Los Angeles, Kalifornien, der Ben Hur gefilmt hat, erklärt in einem Interview, daß „Esperanto“ für den Sprechfilm unbedingt nötig sei, wenn man sein Verwendungsgebiet nicht begrenzen wolle. Die englische Sprache genüge hiefür nicht.

I. Wiener Esperanto-Klub

I. Annagasse 5, I.

Vortragssaal „Politische Gesellschaft“

Beginn 7·30 Uhr abends.

Programm 1928/1929:

14. Dezember 1928

Gedenkfeier für Dr. Zamenhof und Oberst Zwach (Wien).

11. Jänner 1929

Dr. C. Th. Dumba, Botschafter a. D., Präsident der Völkerbundliga: *Deutschtum und Völkerbund.*

8. Februar 1929

Unterhaltungsabend.

1. März 1929

Dr. Friedrich Rucker, Min.-Rat im Bundesministerium für Handel und Verkehr: *Die Entwicklung der Fremdenbeherbergung. (Mit Lichtbildern.)*

22. März 1929

Hofrat Dr. Richard Schumann, Professor an der Technischen Hochschule: *Ueber die Lagerung der unterirdischen Schichten im Wiener Becken. (Mit Lichtbildern.)*

12 April 1929

Dr. Kurt Frieberger: *Vom Geiste der Sprache.*

3. Mai 1929

Prof. Dr. V. O. Ludwig, Konservator d. öst. Bundesdenkmalamtes, Bibliothekar des Stiftes Klosterneuburg: *Der Verduner Altar. (Mit Lichtbildern.)*

24. Mai 1929

Dr. Viktor Matejka: *Kriegsmöglichkeiten der Zukunft.*

7. Juni 1929

Hofrat Dr. Fr. Wollmann, Landesschulinspektor und Direktor der Staatsprüfungskommission für Englisch, Französisch und Esperanto: *Esperanto und die Schule.*

28. Juni 1929

Viktor Hawlik, Min.-Rat im Bundesministerium für Handel und Verkehr: *Der ideale Staat.*

•

Die Vorträge finden in deutscher Sprache mit kurzer Einführung in Esperanto statt. Gäste willkommen!

„Die Tagespost“, Linz, berichtete, daß die Herren Meisleder u. Bürger die E.-Staatsprüfung mit sehr gutem Erfolg abgelegt haben.

Esp.-Gottesdienst in Wien:

16. Dez. 1928, 10 Uhr, I., Minoritenkirche.

La nova prezidanto de nia Respubliko.

La 5. de decembro la reprezentantoj de la aŭstria popolo elektis la prezidanton de l' aŭstria parlamento

Wilhelm Miklas

prezidanto de nia respubliko.

Ni esp.-istoj ĝoju pri ĉi tiu elekto jam pro tio, ĉar la nova prezidanto estas amiko al nia movado.

Zamenhof.

Ĉie en la mondo, kie vivas esp-istoj, ili festos la naskiĝtagon de nia Majstro.

Sed plej bone ni honoru lin per aĉeto de libroj.

Do neniu postrestu!

Ĉiu aĉetu almenaŭ unu libron!

ICK-prezidanto s-ro John Merchant

en grava alvoko sin turnis al la tutmonda esperantistaro kaj ĝin invitis al ega kunlaboro pro bonega progreso de nia movado.

Pro manko de loko ni ne povis publikigi la tekston, sed certe ĉiu el vi estas leganto de „Esperanto" aŭ „Heroldo" kaj pro tio konas la enhavon.

Ni aŭstriaj esperantistoj ege subtenis kaj ĉiam subtenos per ĉiuj fortoj la movadon kaj per tio certe ankaŭ ni kontentigos la dezirojn de nia ŝatata ICK-prezidanto.

Int. Esperanto-Muzeo, Wien.

La membroj de IEMW. bonvolu afable sendi sian jarkotizon por 1929 en poŝtmarkoj el Aŭstrio kaj en UEA.-kuponoj el eksterlando per simpla letero.

En la **„Internacia Kuratora Komitato"** eniris laŭ nia peto nia konata verkisto kaj L. K.-ano H. J. Bulthuis Haag, Nederlando.

Materialo ricevita:

Laŭ donaclistoj n-ro 97, Grössinger-Salzburg, 98. Pernegg-Eggenberg, 99. Sophie Cipera-Linz, 100. Bruno Migliorini-Roma, 101. Bulgara Esp.-Asocio-Ruŝe, 102. Skolta Heroldo-Paris, 103. Ed. Schnürmacher-Wien, 104. S. Zalmanovici-Bucuresti, 105. Rev. L. A. Long-Middlesbrough, 106. Vojo de klerigo-Ĥarkow, 107. Hungara Heroldo-Budpapest, 108. E. Dauce-Valmiera (Latvio), 109. Scienca Asocio-Paris, 110. O. Bünnemann-Hamburg, 112. Las Noticias-Barcelona, 113. F. Gorgues Torredeflot-Barcelona, 114. Inĝ.-Orengo-La Spezia, 115. A. Mair-Innsbruck, 116. Deutschsr Esp.-Bund-Berlin, 117. Koopera Soc. „Posrednik"-Sofia, 118. Novosibirska Komitato-Novosibirsk, 119. Dreves Uitterdijk-Hilversum, 120. Bahaa E.-eldonejo-Wandsbeck, 121. H. Sentis-Grenoble, 122. Brita E.-Asocio-London (ĉiujn jarkolektojn de 1905, jam tole binditе), 123. Arbeiter-E.-Bund-Leipzig (3 pakaĵojn).

21-a Universala E.-Kongreso
5-a Somera Universitato.

Budapest, 2.—9. aŭg. 1929.

LKK: Honora prez.: reĝa reg. ĉefkons. d-ro Patai; prez.: prof. J. de Mihalik, d-ro Loránd kaj, minist. kalkulĉefkons. J. N. Molnár; sekr.: komerc. Paŭlo Tolnai kaj bankofic. P. Balkányi; kas.: komerc. Elek Tolnai; protok.: s-ino Bencze; komitatanoj: verkisto Julio Baghy, parlamenta koncept. Lajos Kökény, reĝa financa koncept. d-ro Gyula Lukács, bankofic. d-ro Jos. Szilágyi, d-ro Jos. Takács, poŝtinsp. J. Zöldy.

Aliĝiloj riceveblaj Wien, I., Annagasse 5.

Kotizo: 35 aŭ. ŝil.

Pagoj: „Esperanto-Kongreso" — Budapest aŭ al la kongresa banko Pesti Magyar Kereskedelmi Bank, Budapest, V. Tisza Istvan u. 2.

Informpetojn bonvolu aldoni respondafrankon.

Donacoj volonte akceptotaj.

Oficiala organo: Hungara Heroldo, Budapest, X. Pongracz u. XVII/I.

Loĝigo: Bonvolu anonci vin kiel eble plej frue. Prezoj en hoteloj kun matenmanĝo de 4—12 pengö.

Turista loĝejo en lernejoj ktp. sen manĝoj P. 1.20.

Prezoj en restoracioj: Tagmanĝo de P 1.50 kaj vespermanĝo de P 2.

Rabatoj: Partoprenantoj en la Wien-a Antaŭkongreso ricevos je montro de la aŭstria kongreskarto 25% rabaton sur fervojo kaj 50% sur la ŝipoj. (Vidu „Antaŭkongreso".)

„Malfermo de Int. E.-Muzeo, Wien“
„Antaŭkongreso al la XXI-a.“
29. 7. — 1. 8. 1929.

Kotizo: Ŝ 7.—, abonantoj de AE. pagas Ŝ 2.— malpli.

Vidu la ĝisnunajn sciigojn en AE.

Rabato: 25% sur fervojo al Wien kaj reen kaj 50% sur ŝipo de Passau al Budapest kaj reen, sed **nur je montro** de la „Antaŭkongreso-Karto“.

Ni estas en ega kontakto kun LKK.-Budapest kaj kune varbos, unu por la alia, je bonega sukcesigo de 21-a kaj ties „Antaŭkongreso“ en Wien.

En la januara n-ro ni detale jam informos vin.

Do jam nun aliĝu! Informpetojn aldonu respondafrankon.

Adreso de la Komitato: Wien, I., Annagasse 5.

Steiner, prez.

Intervjuo kun sekcia kons. inĝ. Erwin Deinlein.

Antaŭ jaro mi sukcesis interesigi s-ron sekcian kons. inĝ. Erwin Deinlein, referanto pri fremdul-trafiko en Ministerio por komerco kaj trafiko en Wien, pri Esperanto tial, ke li decidis eldonigi 20.000 propagandilojn, belege ilustritajn „Tra Aŭstrio“.

En septembro okazis „Kvara intern. kongreso de oficialaj organoj por turistika propagando“ en Budapest. Mi nun vizitis s-ron Deinlein kaj li donis al mi jenajn klarigojn pri tiu parto de la kongreso, kiu koncernis E.-on. Li diris laŭvorte:

„En ĉi tiu kongreso, en kiu estis reprezentataj kiel en la lasta jaro la oficialaj fremdultrafikoficejoj de la plej multaj ŝtatoj eŭropaj, la demando pri la neceseco de lingvo por internacia fremdul-trafik-propagando ludis la rolon de detala interkonsiliĝo. Je ĉi tiu okazo mi, kiel reprezentanto de aŭstria ministerio por komerco kaj trafiko, aludis la ege favorajn spertojn, kiujn faris la ministerio per sia per Esperanto farita propagando kaj rekomendis al la reprezentantoj de la aliaj ŝtatoj, sekvi ĉi tiun metodon. Kvankam kelkaj reprezentantoj devis konfesi, ke ili ĝis nun ne ankoraŭ estis farintaj fremdul-trafik-propagandon per Esperanto, tamen la kongresanaro ĝenerale konvinkiĝis, ke la uzado de Esperanto ĝuste en ĉi tiu fako estus same diversmaniere aplikebla kaj sukcespromesanta.“

Sekvo de tio estas, ke Ministerio por Komerco je iniciato de s-ro inĝ. Deinlein por 1929 denove eldonos prospekton, kiun mi tradukis denove, kaj jam nun oni povas mendi ĝin ĉe „Int. Esperanto-Muzeo“ Wien, I., Annagasse 5.

Steiner.

Gravaj konfesoj de mondfama filmdirektoro.

De Joroŝo.

Los Angeles, Kalif.

La filmdirektoroj pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto. Subite ili ekkonas, ke universala lingvo estas absolute necesa, se ili volas eksterlanden vendi parolantajn filmojn.

Unu el la plej unuaj homoj rekomendantaj E.-on estas la mondfama filmdirektoro Fred Niblo ĉe la fama kaj grandega filmfarejo Metro-Goldwyn-Mayer Studio. Li estas la viro, kiu filmis „Ben Hur“.

Antaŭ nelonge Joseph R. Scherer, UEA.-del. kaj prez. de E.-Klubo de Los Angeles, kune kun d-ro Chas. R. Witt, vic-prez. de la klubo, estis invitataj, viziti s-rojn Fred Niblo kaj Joe Polonsky en iliaj oficejoj, por diskuti la eblecojn kaj planojn pri la elekto de E. por la parolantaj filmoj. Kelkaj el la direktoroj de tiu granda filmfarejo M-G-M estas favoraj al E., ĉar ili ekkonas la fakton, ke E. nepre estas necesa por universala sukceso de la parolanta filmo.

La fama filmdirektoro tre afable respondis je multaj demandoj. La respondoj jam estis presataj en multaj Usonoj gazetoj, sed ĉi sube mi volas ripeti liajn plej gravajn eldirojn. Jen la demandoj de s-ro Scherer kaj la respondoj de s-ro Niblo:

D. Kiam vi unue aŭdis pri E.?

R. Antaŭ multaj jaroj mi legis pri E. kaj aŭdis pri ĝi, kiam mi laboris en Eŭropo.

D. Kial vi nun subite estas pli multe interesata en nia universala lingvo?

R. Mi ne havis multan tempon por E. Mi ne bezonis la lingvon. Sed ĉar nun la parolantaj filmoj estas tiel multe ŝatataj en la tuta mondo, nova problemo ekaperis. Estas problemo de nia ekzisto, de nia sukceso en

Eŭropo. La angla lingvo ne estas dezirata en la kontinenta Eŭropo. Universala lingvo estas nepre necesa por niaj novaj filmoj. Estas afero de mono. Se la filmoj ne estas uzeblaj en Eŭropo, niaj profitoj estas pli malgrandaj.

D. Ĉu vi ne opinias, ke filmsteloj povus lerni diversajn naciajn lingvojn?

R. Tute ne! Tio estas absolute neebla. Ĝi teorie estus ebla, sed ne praktike. Multaj bonegaj filmsteloj ne havas lingvan talenton. Plej ofte bonaj elparolistoj en unu lingvo ne povas lerni la akcenton de eĉ unu alia lingvo. Famaj eksterlandaj steloj devus lerni kun granda peno la anglan akcenton kaj eble ĉiam estus limigataj je eksterlandulaj roloj.

Sed eĉ se estus praktike eble bone lerni tiom da lingvoj, ĉiam restus financa neeblaĵo, fari la saman filmon en diversaj lingvoj. Ne, tute ne, tio estos neniam ebla; la kostoj estus terure altaj kaj nenia profito rezultiĝus.

D. Sed la usonaj filmoj povus esti montrataj almenaŭ en Britlando, ĉu ne?

R. Jes, sed vi devas memori, ke nia Usono angla lingvo ne estas tre agrabla al granda parto de la angla popolo. Ni havas krome multajn idiomaĵojn, kiuj ne estas komprenataj de britoj. Tie ili havus aliajn idiomaĵojn, kiujn ni ne komprenas. Kaj la idiomaĵoj ja donas al la lingvo la spicon.

La angla lingvo en britaj filmoj ne estos ŝatata de la plimulto de usona popolo. Sed krom tio ĉio ni ja tute ne deziras perdi la klientaron de la kontinenta Eŭropo kaj aliaj landoj.


D. Ĉu usonaj parolantaj filmoj ne povus esti montrataj kiel „silentaj filmoj" en la kontinenta Eŭropo?

R. Tute ne, ĉar la eŭropanoj rifuzos esti tiel malĝentile malatentataj. La eŭropaj filmfarejoj ja ankaŭ faros parolantajn filmojn kaj sen akcepto de ia neŭtrala lingvo la nun tiel ŝatataj usonaj filmoj nepre fariĝus malŝatataj. Ankaŭ la estontaj grandaj filmoj de germanaj, francaj, italaj kaj aliaj filmfarejoj estas limigataj je sia propra lando sen la simpla sed plej kompleta, plej logika kaj plej facila lingvo — la neŭtrala Esperanto.

D. Kiuj estas viaj plej famaj filmsteloj?

R. Norma Shearer, John Gilbert, Ramon Navaro, William Haines, Lewis Stone, Lionel Barrymore, Greta Garbo, Conrad Nagel estas niaj plej famaj. Estus tre domaĝe, se ili ne plu estus videblaj en Eŭropo pro manko de lingva scio.

Poste s-ro Scherer donacis al s-ro Niblo E.-flagon kaj insignon, kaj la fama direktoro ĝojis pro la donaco tiom, ke li tuj ordonis la fotografadon de la transdonado.



La adreso de la direktoro estas: Fred Niblo, ĉe Metro-Goldwyn-Mayer Studio, Los Angeles, Kalifornio. Car subskribo-kolektoj nur malfacile organiziĝas, estus tre helpa, se arego da esp.-istoj sendus E.-gratulojn al la fama direktoro.

La eldiroj de s-ro Niblo estas tiel gravaj por nia movado, ke ĉiu fervora esp.-isto certe deziros publikigi la artikolon en gazetoj de sia urbo.

S-ro Scherer ĉe Seaboard National Bank, Los Angeles, Kalifornio, deziras ricevi kiom eble plej multajn gazeteltranĉojn, se eble kun kopioj de la fotografaĵoj. Li bezonas la multlingvajn eltranĉojn (Esperantajn kaj aliajn) por plia propagando inter la filmeminentuloj.

Esperanto en Greklando.

Aperis antaŭ nelonge eminenta gramatika libro de d-ro Stamatiadis, senlaca kaj malnova pioniro en Greklando. (Vidu la recenzon sur p. 133.)

Ni petis nian altŝatatan grekan samideanon, havigi al ni kelkajn historiajn datojn pri la E.-movado sialanda.

Al la raportinto ni esprimas nian elkoran dankon.

Jen la raporto, kiu certe interesos niajn legantojn:

„En oktobro 1906 estis fondita en Samoso „Samosa Esperantista Societo“, oficiale aprobita de la samosa registaro laŭ princa ordono sub n-ro 822 d. d. 10. de decembro 1906. Bedaŭrinde pro malkompreno la registaro de la tiama princlando nuligis sian ĉirilatan aprobon kaj nur post alveno de la princoreganto ekscelenco F. Georgiades (mia parenco) en Samoso nia E.-societo estas definitive restarigita en 1907.

Tamen sian plej grandan progreson SES. ŝuldas al la maljuste kaj malhumane insidmortigita, bonega princoreganto eks. Andreo Kopassis kaj al lia bonkora kaj nobla edzino, princino Heleno *) (el la aŭstria familio barono Chiari). Ambaŭ geprincoj — mi havis la honoron esti ilia familia kuracisto — fervore subtenis nian societon kaj dank' al ili la tiama princlando krom sennombraj aliaj efektivigitaj progresoj devige per leĝo enkondukis la mondhelplingvon en ĉiujn publikajn lernejojn de la insulo.

Nia neforgesebla majstro d-ro Zamenhof, kun kiu mi tiam regule korespondadis kaj kun kiu mi persone konatiĝis dum la 5-a Int. E.-Kongreso en Barcelona, estis tiel entuziasmigita pro la apliko de la koncerna leĝo en Samoso (la unua leĝo en la tuta mondo pri deviga instruado de E.), ke li propra-iniciative skribis al ŝia princina moŝto (diplomita de SES.) sekvantan leteron:

Varsovio, 18. XI. 1910.

Via Princina Moŝto!

Kun granda ĝojo ĉiuj Esperantistoj sciiĝos, ke dank al via helpo la lingvo Esperanto estas nun enkondukita kiel deviga objekto de lernado en ĉiujn lernejojn de la Samosa Princlando. Permesu, ke en la nomo de la Esperantistoj mi esprimu al vi mian koran dankon. Ankaŭ la Samosa junularo pli aŭ malpli frue kore vin dankos kaj komprenos la valoron de la altidea servo, kiun vi faris al la kreskanta generacio de Via lando. Via granda amo al nia homunuiga afero kaj Via sincera kaj fervora laborado por ĝi alportos kuraĝon al multaj Esperantistoj, kiuj ĝojos, ke ili povas nomi Vin sia Samideanino, kaj certe penos imiti Vian belan ekzemplon.

Kun profunda estimo

d-ro Zamenhof.

Al tiu letero ŝia princina moŝto respondis jene:

Samoso, 18. Decembro 1910.

Altestimata Doktoro kaj kara Majstro!

La afabla letero de la 18. de novembro, per kiu Vi bonvolis honorigi min, faris al mi tre grandan plezuron. Mi daŭrigas okupi min pri ĉi tiu riĉa kaj bela lingvo, kies vi estas la elpensinto kaj kiu havas la sanktan celon de la interfratiĝo de ĉiuj popoloj.

Efektive nia Princolando estos de nun, dank' al la senlacaj klopodoj de via honorinda kaj estimata delegito s-ro d-ro Anakreon Stamatiadis, Prez. kaj Fondinto de Samosa Esperantista Societo, lando, en kiu nia karega lingvo enradikiĝos inter la juna generacio. Mi mem faros ĉion eblan, apogita al tio de la Princo-Reganto, por kontribui kiel eble plej bone al la disvastiĝado de nia sankta afero.

Bondezirante feliĉan novjaron, mi Vin petas akcepti, altestimata Doktoro kaj kara Majstro, la certigon de mia plej alta konsidero.

Heleno Kopasis.

La reganto, kiu sekvis la grandaniman princon A. Kopasis, pro ĵaluzo kaj envio kontraŭ sia nesuperebla antaŭulo, komencis tuj post sia alveno Samoson persekuti ĉiujn amikojn de tiu bedaŭrinda princo-reganto kaj la hontindaj kalumnioj, kiujn oni amasigis sur ilin, igis min mem ankaŭ devige forlasi mian patrolandon tute ne suspektante, ke tiu lasta reganto, brue forsendita iom poste de la tuta Samosa popolo, devus esti la lasta reprezentanto de la turka registaro en Samoso.

Ekzilita tiamaniere Konstantinoplon, mi profitis la okazon por fondi en la ĉefurbo de Turkujo gravan E.-societon „Bizantio“ kun samnoma ilustr. 32 paĝa ĵurnalo. Fine ricevinte mian pensiiĝon post 25-jara sanitara servo en Internacia Porsaneca Administracio de Turkujo, kies plej superan postenon kiel membro de Int. Supera Konsilantaro mi atingis, enoficigita per imperiestra Iradé, mi reiris mian patrolandon, jam feliĉe kunigita kun nia komuna patrujo Hellado.

Je mia reveno Samoson la tiea E.-societo estis restarigita kaj ĝia oficiala

*) La princino vivas nun en Wien kaj estas daŭre fidela esp.-istino.

organo „Samosa Esperantisto“ (anstataŭ „Greklingva Esperantisto“) reeldonita. Sed post jaro, pensinte, ke la ĉefurbo de Grekujo prezentas pli bonan grundon por la disvastigado de Esperanto, mi instalis min en Ateno. Tie ĉi post la fondo de Helena E.-Asocio, oficiale aprobita de la greka registaro, ni fondis ankaŭ „Helenan E.-Instituton“, kiu bonege funkcias, disdoninte ĝis nun proksim. 75 diplomojn diversgradajn. En Grekujo aliaj E.-grupoj estas fonditaj dank' al miaj lernantoj en Pireo, Saloniko kaj post nelonge tia estos fondita ankaŭ en Patraso. En Ateno de 2 jaroj E.-kursoj estas regule gvidataj de mi mem en la vesperaj kursoj de la universitato, en la unuagradaj kaj mezgradaj instruistaj institutoj de Ateno, ĉe la policanoj de la urboj kaj en kelkaj komercaj lernejoj de la ĉefurbo.

Kiel vi vidas: Ni tre malrapide, sed konstante progresas.“

Esperanto-Institut für das Deutsche Reich.

Am 12. November d. J. beging das Esperanto-Institut für das Deutsche Reich die Feier seines 20jährigen Bestandes. In diesem Zeitraum hat das Institut viele große Aufgaben erfüllt.

Wir entnehmen die nachfolgenden Angaben einem ausführlichen Berichte seines gegenwärtigen, bewährten Leiters Oberstudienrat Dr. Johann Dietterle (Germana Esperantisto 1928, n-ro 11):

Das Institut — das erste in seiner Art — wurde im Jahre 1908 nach dem Esp.-Weltkongreß in Dresden gegründet und unter dem Namen „Sächsisches Esperanto-Institut“ dem sächsischen Staatsministerium des Innern unterstellt. Zu seinem Leiter wurde Dr. A. Schramm gewählt.

Ihre ursprüngliche Aufgabe erblickte die Institutsleitung in der Förderung des Unterrichtes und des Prüfungswesens, sowie in der Einführung des Esp. in kaufmännische und industrielle Kreise. Schon in den ersten Jahren wurde Esp. in 45 Kursen mit 1707 Hörern unterrichtet. Es wurden eine Bücherei geschaffen und die Zeitungen „Universo“, „La bela mondo“ und „Rund um die Welt“ herausgegeben, die aber später ihr Erscheinen einstellen mußten.

Nachdem die Ortsgruppen die Unterrichtskurse übernommen hatten, widmete sich das Institut besonders dem Prüfungswesen.

Im Jahre 1912 wurde das Institut nach Leipzig verlegt, wohin sein erster verdienstvoller Leiter Dr. Schramm eine Berufung als Direktor des Deutschen Buchgewerbe- und Schriftenmuseums erhalten hatte. 1914 errichtete das Institut in der Ausstellung „Bugra“ einen eigenen Esperanto-Pavillon. Dr. Schramm schlug, da ihm seine Amtstätigkeit zu sehr dem Institute entzog, zu seinem Nachfolger Dr. Dietterle vor. Von da an und insbesonders nach Rückkehr Dr. Dietterles vom Kriegsdienste (1918) hat es sich das Institut zur Aufgabe gemacht, eine „neutrale“ Zentralstelle für die Bewegung zu schaffen und das Prüfungswesen auf breiterer Grundlage aufzubauen. Jetzt arbeiten im Reich bereits 28 Prüfungskommissionen nach einheitlichem System.

Im Jahre 1922 ist aus dem „sächsischen“ das „Esperanto-Institut für das Deutsche Reich“ hervorgegangen.

Große Verdienste um das Institut haben sich sein finanzieller Gründer Geh. Kom.-Rat Förster und das ehemalige Mitglied der 2. sächsischen Ständekammer Dr. Albert Steche erworben.

„Es dürfte nicht unangebracht sein, darauf hinzuweisen“, schreibt Dr. Dietterle, „daß sich die Neutralität des Institutes auch in der Zusammensetzung seines jetzigen Direktoriums zeigt, in dem der Deutsche Bund, der Arbeiter-Esperanto-Bund für das deutsche Sprachgebiet, UEA., SAT., die katholischen Gruppen und die Lehrerschaft vertreten sind . . . Es ist nicht eine Neutralität, bei der man nicht weiß, welcher Richtung man sich anschließen soll, sondern die Neutralität, die im Hinblick auf ein gemeinsames Interesse allen Richtungen in gleicher Weise zu dienen sucht, damit der Gedanke einer Welthilfssprache in allen Ständen und Schichten des Volkes festen Fuß fassen soll.“ (Wahrlich beherzigenswerte Worte! Wahrlich, wenn diese Worte bei den österr. Esperantisten beherzigt werden würden im Sinne eines energischen Zusammenarbeitens, wir würden bei den schon geschaffenen guten Vorbedingungen, Esperanto in allen Ständen und Schichten festen Fuß fassen helfen!)

Dieser auszugsweise Bericht bedarf jedoch einer Ergänzung. Es darf nicht unterlassen werden darauf hinzuweisen, daß das Institut seinen großen Aufschwung, seinen in der ganzen Esperantowelt anerkannten guten Ruf gerade jenem ausgezeichneten Manne verdankt, der seit 14 Jahren unermüdlich an seiner Spitze stehend, früher seine vom Beruf

freie und seit seinem Übertritt in den Ruhestand seine ganze verfügbare Zeit der Führung und dem weiteren Ausbau dieser Anstalt widmet und für Esperanto segensreich wirkt: unserem hochgeschätzten kara samideano Dr. Dietterle.

Wenn Dietterle meint, „20 Jahre geben noch keinen Anlaß zu einem Jubiläum", so berechtigen sie doch zu einem Rückblicke auf geleistete Arbeit, auf die sowohl die Leitung als auch seine Mitarbeiter stolz sein dürfen.

Sós.

El mia vivo.

(Daŭrigo.)

J. Ŝirjaev-Baklanka, USSR.

Antaŭ la printempo la kurso estis finita. Tamen la sabatkunvenoj daŭris kaj dum ili ni babilis en E., legis kaj fervore verkis longajn leterojn al niaj alilandaj korespondantoj-amikoj. Dum la vintro ni vendis kelkajn centojn da lernolibroj, vortaroj kaj ekzercaroj. Ne havante sufiĉan monon por aĉeti unufoje multajn librojn, mi preskaŭ ĉiusemajne ŝarĝis nian karan Majstron per novaj mendoj de ili, tute ne sciante, kiom da tempo per tio mi ĉiam forprenis de li.

En la komenco de la printempo la knabino kun la patro forlasis la urbon kaj mi devis ankoraŭ kelkajn semajnojn resti tie por fari miajn ekzamenojn. Kortuŝa estis mia disiĝo de ili sur la vaporŝipo, al kiu mi akompanis ilin. Antaŭ la disiĝo mi devis doni al ili promeson, ke somere mi nepre vizitos ilin en la kamparo kaj gastos tie.

Post ilia forveturo mi eksentis min orfiĝinto kaj longe sopiris. De tempo al tempo mi vizitis la maljunulinon, kiu ĉiam malsanetis. Kiam finiĝis la ekzamenoj, ŝi subite tute malfortiĝis kaj petis min, ke mi restu kaj pasigu kun ŝi la reston de ŝia vivo. Tio ne daŭris longe. Ŝi mortis vere kristane kun preĝo sur la lipoj kaj la lastaj vortoj de ŝi estis danko al Dio, kiu permesis al ŝi plenumi la promeson, kiun ŝi donis, ellerni Esperanton. Estas superflue diri, ke ŝi petegis min, neniam forlasi la E.-movadon, kies grandan estontecon ŝi antaŭvidis akrevide. Pli grandan perdon, pli grandan malĝojon mi ŝajne sentis neniam dum la vivo. Ŝia morto ĝuste koincidis kun la komenco de mia E.-literatura agado kaj la unuan mian originalan literaturaĵon, baldaŭ senditan post ŝia morto al „Lingvo Internacia", mi subskribis sub influo de mia malfeliĉo „J. Malfeliĉulo", kio poste por longa tempo fariĝis mia literatura pseŭdonimo.

*

Nia bonega, altŝatata redaktoro petis min verki por la gazeto mian „historieton"; mi tro entuziasmiĝis, forlogiĝis de la pasintaĵo kaj nevole transiris limojn de la antaŭsupozita rememorartikolo. La priskribita kaj kelkaj pluaj jaroj de mia E.-vivo antaŭ kelkaj jaroj servis al mi kiel materialo por granda kaj altinspirita kvazaŭ-romano „Sen titolo", kiu bedaŭrinde ĝis nun restas en manuskripto. En ĝi mi detale priskribis ĉion memorindan el tiu ĉi neforgesebla periodo de la vivo, tial de nun mi penos esti pli konciza en la rakonto, esperante, ke tiuj, kiuj interesiĝas pri tio, iam sukcesos tralegi la aluditan verkon.

Poste pasis tago post tago, jaro post jaro en izoleco. Novajn kursojn mi plu ne organizis en la urbo, miaj antaŭaj gekursanoj kaj konatoj forlasis ĝin, krom mi ree neniu el esperantistoj estis en ĝi. Tiun ĉi tempon kiel ankaŭ la tutan pluan vivon mi dediĉis al E.-literatura agado. Mi verkis, tradukis, kunlaboris en naciaj ĵurnaloj de Svedujo, Danujo, Bohemujo kaj Bulgarujo, en kiuj mi presigis tradukojn nacilingvajn de miaj laboroj. La vivo fluis monotone, senkolore. Nur veraj festoj por mi estis tiuj nemultaj tagoj, kiam venis ia numero „Lingvo Internacia", aperinta tre malofte kaj neregule. En tiuj tagoj mi ĉion forgesis, kvazaŭ renaskiĝis kaj en ia ebriiĝo respektege legis kaj relegis paĝon

post paĝo, kun ĝuo mi eĉ enspiris en min agrablan odoron de ĝia freŝa preskolorilo. Tio ĉi daŭris longan tempon, de tago al tago, ĝis kiam mi jam sciis parkere ĉiujn versaĵojn el ĝi. Poste sekvis longa turmenta atendado de plua iam aperonta numero.

Daŭrigota.

Gravaĵoj el la mondo:

E.-parolado ĉe „Polskie Radjo"-Warszawa de s-ano Wiesenfeld la 15. de decembro vespere. Aŭskultu kaj skribu pri bona akcepto al la sendstacio.

Esperanto-Radiovespero ĉe Radiostacio je la nomo de Komintern (ondlongo 1450 m) — Moskvo okazos la 15. XII., dediĉita je la naskiĝtago de Zamenhof. Komenco precize je la 9 h 20, daŭro ĝis 10 h 30 laŭ MET.

(Arb. Esp.)

9-a Kongreso de SAT. okazos dum aŭgusto 1929 en Leipzig.

Paneŭropo, fama verko de Coudenhove-Kalergi, esp.-ita de d-ro Sós estos eldonota, se ĝis fino de januaro 1929 antaŭmendos ĝin 600 personoj. Ili pagos por la altvalora verko (176 pĝ.; 16×24 cm) afrankite nur S 4·—. Antaŭmendu ĉe Paneŭropa-Unio, Wien, I., Hofburg.

Kion volas Paneŭropa-Unio?

Paneŭropa-Unio petis d-ron Sós, ke li traduku ĉi tiun 16 pĝ. libreton, kiu donas klarigon pri ĉiuj koncernaj demandoj. Prezidanto Coudenhove-Kalergi montris per la eldonado en E., ke nia lingvo vere kapablas, diskonigi en la tuta mondo la ideojn de Paneŭropo. La tre flue skribita informilo (senpage ricevebla) certe interesos multajn kaj ankaŭ instigu ilin, aliĝi al Paneŭropa Sekcio de P. U., Wien, I., Hofburg. Sendu 2 int. respondkuponojn au 1 UEA. po 50 ctm kaj vi ricevos afrankite la broŝuron „La Paneŭropa-Manifesto".

Manĝokarto en Esperanto.

En la 15. kaj 16. etaĝoj de „nubgratanto" en Stockholm situas restoratio Pagod, kie je dispono de la gastoj estas bela manĝokarto en sveda kaj E.-lingvoj. Ĉefservistino partoprenas E.-kurson de s-ro Ĉe.

AŬSTRIA ESPERANTO-DELEGITARO

Bisamberg bei Wien 248.

Aŭstria E.-Konferenco.

okazos la 6. de januaro 1929 je la 9 h en kafejo Gartenbau, Wien, I., Parkring 10 (subteretaĝo).

Tagordo:

1. Raportoj de la funkciuloj.
2. Raporto de Prepara Komitato Graz-Wien.
3. Ĉeso de AED.
4. Fondo de Aŭstria E.-Asocio (neŭtrala).
5. Firma statutaro laŭ propono de E.-Soc. por Stirio.
6. Elektoj.
7. Ligo de E.-amikoj.
8. Internacia E.-Muzeo.
9. Aranĝoj en 1929 (Malfermo de IEMW. kaj Antaŭkongreso).
10. Proponoj.

*

Je la 1-a ni komune kaj malmultekoste tagmanĝos kaj poste tuj daŭrigos la konferencon.

Proponojn oni sendu duobligite ĝis 1. I. 1929 al AED.-prez.

Necesas, ke la grupestroj mem venu aŭ sendu almenaŭ delegiton. Ili alportu rajtigilon, subskribitan de l' prez. kaj sekr. kun grupstampilo.

Ĉiu grupo havas por 1—20 membroj (1), 21—50 (2), 51—100 (3) voĉojn. Unu delegito nur rajtas reprezenti 3 delegitrajtojn.

Venu multnombre, ankaŭ nedelegitoj jam pro punkto 9.

La jam la 5. I. alvenintaj kunvenos kun la Wien-anoj je la 8 h vespere en „Schöne Sklavin", Prater, Venedigerau.

AED.: Steiner, prez.; Weber, ĝen.-sekr.

EDW.-kunsido okazis la 1. XII. en la ejo de ofichavantoj. Oni priparolis Zamenhofan memorfeston, kiun Unuiĝo por ĉiuj Wien-aj grupoj aranĝos la 14. XII., kaj elektis d-ron Jokl (anstataŭanto s-ron Ĉech) saluti nome de EDW.

Braunau. Grupo fondita. Ejo Hotelo Fink.

Supra-Aŭstria E.-Soc.-Linz vigle laboras. Kun permeso de Stadtschulrat E. nunjare estas instruata en knabina burĝlernejo-Raimundstraße (3 kursoj). Ĝi eldonas nun laŭ bezono por la membroj senpage internan informilon, kiu multe helpas al intima kontakto inter la membroj de la societo. Ĝi per tiu informilo sekvis la ekzemplon de la Graz-anoj. Gratulon pro viaj klopodoj.

Salzburg: S-ano Lidl parolis en instruistin-seminario de Ursulinoj. En reallernejo li gvidos kurson, kiun partoprenos ankaŭ gimnazianoj. Anoncis sin 41. Reallerneja direktoro Novak, lerninte E.-on estante studento, multe helpas.

Wien: **I-a E.-Unuiĝo en Wien**: La 23. de nov. Unuiĝo malfermis sian novan hejmon en la klubejoj de „Politische Gesellschaft". Post salutvortoj de l' prez. prelegis d-ro Sós de li tradukitan belan novelon „Suter" de Stefan Zweig. La anoncita prelegado de mag. Taussig ne okazis, ĉar li estis malsana. 40 pers. ĉeestis. La programo por 1928/29 troviĝas en la germana parto. Kunvenoj ĉiun vendredon de la 7a en nia klubejo. „**E.-Soc. Danubio**": „Franz Schubert-soleno" arigis la 3. XII. en nia hejmo pks. 70 personojn, kiuj kun plezuro aŭskultis la prezentaĵojn: Lumbildparoladon de s-ro Vasta; solkantojn de s-ino Niessner, s-roj Popper kaj Vassileff; fortepianakompanon de s-ino Rudolf kaj f-ino Schicketanz; ludon sur fortepiano de s-ino Rutschka kaj kvinteton de ges-roj B. kaj L. Rutschka, Walter kaj Karl Smetana kaj Karl Spaa. Ili ĉiuj estu dankataj pro siaj bonegaj prezentaĵoj. „**Akademia E.-Unuiĝo en Wien**": En kurso p. kom. ĉe Universitato partoprenas 25 pers. Gvidanto d-ro Pfeffer. Nova kurso p. progres. aranĝota.

Invito

al E.-diservo en preĝejo XVI., Ottakringerstr. 215 kaj posta kristnaskofesto en gastejo Opfermann, XVI., Ottakringerstr. 196. Pastra moŝto Kudrnovsky faros mem verkitan lumbildparoladon; krome humoraj paroladoj, kantoj. ktp.

KEU.-grupo „Gajeco".

Rimarkindaj Presaĵoj.

Presejo P. D. Sakelario „Ateno".

Nova Gramatika Libro de la intern. helpa lingvo „Esperanto". (Por la supera kurso), de d-ro Anakreon Stamatiadis.

Por ĉiu recenzanto de iu libro estas agrable, se li povas skribi bonan kritikon. Tiom pli agrable estas, se oni povas komenci la recenzon per la kritiko: bonega, eminenta, laŭdeginda. Tian kritikon meritas la nova gramatiko de nia fervora greka pioniro, kiu per sia verko donis al ĉiu esp.-isto, deziranta perfektiĝon en nia kara lingvo, la taŭgan ilon. Kiel aŭtoro de E.-lernolibro mi ĉiam interesiĝis pri ĉiuj aliaj lernolibroj. Unu el la plej bonaj estis la metoda lernolibro de nia eminenta Johann Schröder, sed verkita nur por germanlingvanoj. Kvankam por scianto de lingvo la tralegado de gramatiko estas iom teda kaj eĉ enuiga, mi tamen povas diri, ke leginte la libron de St. mia intereso pli kaj pli kreskis kaj mi finlegis ĝin kun ĝuo (por uzi la vorton de Butin) kvazaŭ bonan romanon. La nova gramatika libro, skribita tute en E. (kun kelkaj novgrekaj tradukoj de la entenataj ekzemploj) analizas kun mirinda detaleco kaj ekzakteco ĉiujn elementojn de nia lingvo kaj ebligas al la ĝin studanto plej altgradan perfektiĝon. En kvar partoj: I. Gramatiko, II. vortfarado, III. elementa E.-sintakso, IV. instrua fako, pritraktas St. la tutan lernadmaterialon kun bone elektitaj ekzemploj kaj en la instrua fako diversajn vidpunktojn, necesajn por ĉiu esp.-isto, kursgvidantoj kaj profesiaj instruistoj. La verko postulas kaj ankaŭ meritas seriozan studadon kaj kiu tion efektivigis, povas diri, ke li kapablas la lingvon perfekte. Dum mia serioza studado de la libro mi tamen foje ne povis min deteni de rideto. Ĉar en la amaso da bonaj ekzemploj mi trovis du — ĝuste ambaŭ sur p. 42 (duplicitas rerum) — kiuj instigis min al tio. La unua frazo: „Mi estas mortinta". Ĉu mortinto tion povas diri? Mi dubas! Kaj la dua: „Rapidu S-ro Doktoro, mia edzino estas naskonta." Mi estas certa, ke al tia tro malpacienca kaj tro timema edzo ne nur mi, sed ĉiu alia kuracisto, eĉ la aŭtoro (kuracisto) mem respondus: „Kial mi rapidu? Ni ja povas atendi ĝis via edzino estos naskanta." Sed flanken la ŝercon! Mi ripetas, ke la supre nomita libro estas tiel bonega, ke ĝin devus ĉiu samideano posedi, zorge studadi kaj dank al ĝi fariĝi perfekta esp.-isto.

La eksteraĵo de la libro estas luksa, la presaĵo belega. D-ro Sós.

(Vidu ankaŭ la artikolon sur p. 128.)

The Esperanto Publishing Company LTD. London:

Luno de Izrael, rakonto pri la Eliro. Verkis Sir H. Rider Haggard. Tradukis Edward S. Payson kaj Montagu C. Butler. 219 paĝa, 1928.

En la historio de antikvaj tempoj ne ekzistas iu pli grava kaj pli rimarkinda epizodo ol la liberigo de la izraelidoj el la egipta sklaveco (vidu: Malnova Testamento, Dua libro, Eliro), ilia kvardekjara migrado en la dezerto kaj la legendo pri la monto Sinai, de sur kiu Mozeo prezentis al sia popolo la dek ordonojn, kiuj ĝis la nunaj tagoj estas la fundamento de ĉiu etika kaj sociala leĝoj. Novaj arkeologiaj trovoj, precipe papirusoj ŝajnas dokumenti, ke la faraono, sub kies regado okazis la dek plagoj en Egiptujo kaj la eliro de la izraelidoj, ne estis Seti Menepta, la filo de Ramzes la Granda, sed lia nevo Amenzes, la uzurpulo de la trono, verŝajne pereinta en Ruĝa Maro. Laŭ rakonto de skribisto Ana estis princo Seti bonkora, lojala, liberale pensanta viro. Kontraŭ la volo de sia patro li obstine pledis por liberigo de la izraelidoj, pro kio la patro deklaris, nuligi lian heredan rajton al la duobla krono, kaj nomis sian nevon „la sidonto sur la Egipta trono". Post la morto de Ramzes la uzurpulo-faraono kruele traktis la sklavigitan popolon kaj malgraŭ la teruraj plagoj obstinis kontraŭ ilia liberigo. La historion kaj kulturon de tiu epoko, la religian vivon de la egiptoj, la morojn en la faraona kortego kaj intrig-

ojn de korteganoj, la karakteron kaj agon de sorĉistoj kaj pastroj, la suferadon de la izraelidoj kaj la individuecon de iliaj ĉefuloj (profetoj) tre interese priskribas la aŭtoro. La romanecan temon de la libro prezentas al ni la amo inter princo Seti kaj la heroina hebrea knabino Merapi, nomata Luno de Izrael, kiel ankaŭ la fidela amikeco inter la princo kaj la skribisto Ana. Post la fama romano de Prus „La Faraono", tradukita de Kabe, estas ĉi tiu verko la dua egiptologia romano, aperinta en Esperanto. Haggard (1856—1925), la aŭtoro (mi citas el letero de samideano Butler) „vojaĝis tra la tuta mondo, sed speciale interesiĝis pri Sud-Afriko, Egiptujo kaj indiĝenaj problemoj. Li verkis 65 librojn, plejparte romanojn. Luno de Izrael aperis en angla lingvo en 1918. La verko baziĝas sur la dua libro „Eliro" de la Malnova Testamento kaj krome sur arkeologiaj kaj egiptologiaj scioj de la talenta aŭtoro." La Eldona Asocio Esp. en London meritas sinceran dankon pro la aperigo de ĉi tiu tre leginda verko, laŭ enhavo kaj eksteraĵo distinge pliriĉiganta nian literaturon. La traduko estas ĝenerale perfekta kaj esperante bonstila. Nur kelkloke troviĝas vortoj kaj esprimoj, kiuj sin prezentas laŭ nacia idiomo. Preseraroj entute kvin. Ofte manko aŭ malĝusta lokigo de komoj. Mi esperas, ke baldaŭa disvendo de la libro instigos la eldonantojn al plua samkvalita entrepreno. D-ro Sós.

Aliaj:

Spite la vivon! de Miŝu Beraru, eld. Bibliofila", Bucuresti 1928, 107 pĝ., broŝ. sv. fr. 2·—.

La poeto prezentas al la esp.-istaro originale verkitajn „mezgajajn poemojn", kiuj ŝerce, satire kantas pri kongresoj, varbado kaj aliaj flankoj de la movado, pri amo kaj ties mallonga daŭro, pri revoj, agoj kaj malsukcesa rezigno, pri versfarado kaj enuo aŭ

„— ŝerce pri la viv' kaj sentoj
spitanta sin prezentas jen:
Strofar' naskita dum momentoj
de homaj ĝojo kaj ĉagren'."

Mirinda estas la lingva scipovo de l' verkinto, montriĝanta en ĉiuspecaj versoj, en diversaj strofoj kun puraj, agrable sonantaj, parte nekutimaj novaj rimoj. Ankaŭ same nekutimaj vortfaraĵoj troviĝas kaj la lingvo estas ornamita per multaj graciaj vortoturnoj kaj vortludoj. Peter-Bisamberg.

El la intima libro de la verd-urbaj esperantistoj. De Ada. Skizoj el la esperantista vivo. Sofia 1928 (mendebla de la aŭtoro, Sofia Oboriŝte 68). (68 pĝ.) 16°. Sv. fr. 0·60.

La bulgara ministro por popola instruado fermigis en aprilo ĉiujn por lernantoj ekzistantajn kursojn pri Esperanto ĉe la lernejoj kaj malpermesas formi gimnazianajn E.-societojn, disvastigi kaj ricevi E.-gazetojn. Kiu Esperantisto ne rememorus la similajn malpermesojn de la franca ministro por popola instruado en 1923? Tial jena broŝuro de meritplena Ada (Atanas D. Atanasov) estas leginda. Vere ja estas nur imagita vivo, de kiu tiu ĉi „intima libro" estas kvazaŭ albumo, kroniko; tamen ĝi bazas sur efektiva reala vivo de bulgaraj esperantistoj. Duoble konsiderinda, se ni imagas iliajn malfacilaĵojn, vidas iliajn idealismon kaj neŝanceliĝemon. N. Hovorka.

„La forigo de la mortpuno" de Ernst Dehn, Wilh. Date's Bogtrykkeri, Kopenhago, 1927. En la broŝureto la aŭtoro pledas por forigo de mortpuno, kiu en la skandinavaj landoj ne plu ekzistas. Adr.: E. Dehn, Kopenhago Kastelsv. 21.

„Méthode Direkte" kaj **„Comment doit-on se servir du Cours de Francais en Méthode Direkte?"** Du tre interesaj libroj, 90 kaj 30 paĝaj, verkitaj en franca lingvo de Ernest Rochelle, prof. de germana lingvo au Lycée de Bordeaux pri instruado de vivantaj lingvoj per senpera metodo.

„Popularaj kantoj en Japanio", kolekto unua. 12×18 cm, 18 paĝoj, prezo ne notita. Eld. 1927 Kokusaigo-Kenkjû-Ŝa. Traduko de naŭ kantoj, inter ili 8 el Japanlando.

„Nokkel Til Esperanto", la unua E.-ŝlosilo en norvega lingvo. Pr.: 20 norv. oeroj.

„Esperanto, Grammatikk og ordlister". La sama enhavo kiel en la ŝlosilo kun aldono de norvega-E.-a vortareto. 70 pĝ. Pr.: 50 oeroj. Ambaŭ haveblaj ĉe E.-eldonejo AGADO., Oslo, poŝtkesto 407 aŭ Norvega E.-Ligo, Bergsliens gate 11, II, Oslo.

„Konturo de Oomoto", 16 pĝ. ilustr. verketo pri estiĝo kaj esenco de Oomoto-movado. Mendu ĉe Oomoto Eŭropa Centra Oficejo, 24 Rue Bonaparte, Paris VI.

Ŝercangulo.

„Mi aŭdis, ke vi serĉas edzinon per gazeto. Ĉu vi ricevis respondojn?" — „Proksimume 100." — „Kion oni skribis en ili?" — „Plejofte: Prenu mian edzinon!"

•

„Mi ne havas feliĉon ĉe virinoj."
„Do, vi havas feliĉon!"

Korespondado:

PK. = poŝtk.; PI. = pk. il; L. = letero; PM. = poŝtm ; bfl. = PM bildflanke.

Mwanza (Afriko, Tanganyika Teritory), s-ro L. G. Tonini; PI., bfl.

North Carlton N. 4 (Aŭstrelio, Vic.), s-ro D. Mc. Innes, 887 Rathdown Str.; L. PK.

New York, City, Usono; s-ro Pedro Epifanovich, Box 47, Intern. House, 500 Riverside Drive.

Talinn (Estonio), s-ro G. Reimans, Villardi 21 a k. 2 PM.

Kaju Tanam (Nederl., Indio, Sumatra); s-ro Radia Mangkoeto S. M. Ŝamsudin Rassat, Kaju Tanam bei Pedang.

(Laŭ Esperanto kaj Heroldo.)

Literenmet-enigmo.

LON * * * O
FULM * * * ZAGO
BAR * * * ISMO
AK * * * I
BAST * * * DO

AAABCDEGILNNORZ.

Tiuj ĉi 15 literoj oni enmetu anstataŭ la steletoj, por ricevi kompletajn vortojn. La enmetitaj literoj, legitaj laŭlinie nomas du estintajn kongreslokojn.

Premioj: 3 libroj.

Rekomendindaj firmoj.

Korneuburg.

Bäckerei = bakejo:
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.

Gemischtwaren = Diversaĵoj:
Alois Cisaŕ, Bisambergstr. 21.

Kaltenleutgeben.

Peter Pich, komercisto (E), Hauptstrasse 61.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunv.) „Pastete", Sporg. 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Leoben.

E.-Verein f. Steiermark: Cafe Weidbacher, Mi (me) 20—22 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (ĵ) 20—22 h.

Esperanto-Klub, Gasthof „Grüner Baum", Museumstraße. Mi (me) 20—22 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo E.-sta en Wien, I., Schottenhof (Akademikerheim) Mi (me) 17·30—19·30 h.

I. **Esp. Unuiĝo-Wien,** I., Annag. 5, I-a et., klubejoj de „Politische Gesellschaft", Fr. (v.) 19·30 h

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, IV., Schäffergasse 3, Mi (me) de 19 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.

„Konkordo", IV., Margaretenstr. 33 (Kaffee Aŭstria) Do (ĵ) 20 h.

Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—22 h.

Esp.-societo „Danubio", VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—23 h.

Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürgercafé, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16—19 h.

Bohema Klubo Esperantista, XV., Turnerg. 9, I. et., Narodni dum, Mi (me) 20 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.